N-o 2. **BULTENO** 1936. 10. II.

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: O. GINZ, ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

# *Raporto pri agado de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista en 1935.*

(Por XVII-a ĝenerala kunveno okazonta 15. II. 1936)

Tiun ĉi jaron ni versimile prezentas la raporton pri nia agado kiel funkciuloj de ĈAE lastan fojon. Post unu jaro vi legos raporton pri agado de Esperanto-Asocio en ĈSR, kies ekfunkcio ebligos, ke la raporto koncernu ankaŭ la germanajn samideanojn laŭregule kaj laŭstatute reprezentitajn en la nova komitato. La nova pli vasta bazo certe alkondukos al la organizo ankoraŭ tiujn societojn kaj entreprenojn, kiuj staris ĝis nun aparte aŭ en tute libera kaj necerta rilato al la nacia centro.

Petante esperantistojn de la tuta lando, ke ili legu nian raporton atente, ni volas atentigi tiun ĉi jaron pri unu fakto tre rimarkinda. Vidu, ke nia raporto tuŝas efektive ĉiujn regionojn de nia ŝtato. Vi vidas, ke jam nun ni sukcesis efektive atingi per niaj organizaj iloj ĉiujn partojn de niaj regionoj. Sed vidu ankaŭ, ke nia raporto nomas lokojn aŭ landojn de ĉiuj mondpartoj (escepte Aŭstralion), kun kiuj ni kontaktis dum nia agado tiujara. Ne forgesu, pensante pri tiu fakto, atenti, ke ni estas societo malriĉa, vivanta el malgrandaj kotizoj de bonvoluloj. Komparu kun tio amplekson de farita laboro kaj ĝian kvaliton. Tio estas ankaŭ unu argumento por nia movado. Efektive: movado, kiu posedas tiajn organizojn, tiajn organizantojn kaj tiajn organizatojn, jes, tia movado ne povas perei. Tia movado certe atingos sian celon.

1. **Konsisto de la komitato.** La komitato elirinta el elektoj de la ĝenerala kunveno dividis siajn funkciojn en la unua komitata kunveno la 29-an de aprilo. La listo de la funkciuloj kaj komisionestroj estas sur p. 25. La kunlaborado de ĉiuj komitatanoj estis tre bona. La divido de la funkcioj restis sen ŝanĝo dum la tuta jaro.

2. **Komitataj kunvenoj** estis 5. La kvara estis prezidita de d-ro Kamaryt, ĉiuj ceteraj de vicprezidanto d-ro Pitlík. Ankaŭ la eksterprahaj komitatanoj kunlaboris efike. De prezidanto kaj kasisto kaj ankaŭ de aliaj anoj venis informaj kaj proponaj leteroj al ĉiu kunveno. Kopioj de la protokoloj estis ciklostilite multobligitaj kaj sendataj al la neĉeestintaj komitatanoj kaj vickomitatanoj. Protokolis Ing. C. Fr. Staněk, multobligadis kaj dissendadis ilin V. Šavel.

3. **Regionaj kunvenoj.** La tre sukcesan regionan konferencon en L. Bělohrad (p. 52) partoprenis nia vicprezidanto d-ro Pitlík kaj komitatano J. Šustr, prezidanto de E. K. en Praha. La „Tago de esperantistoj" en Kladno, projektata de samideano Stříhavka por 7-an de julio, ne efektiviĝis, ĉar en Kladno estas tro malmultaj organizitaj esperantistoj. Oni ne povas rajte atendi, ke unusolaj partoprenantoj de tia regiona kunveno estu la Prahaanoj. — Niaj membroj ankaŭ tiun ĉi jaron ĉeestis en ĉiuj iom gravaj aranĝoj esperantistaj. Ankaŭ plurfoje ili ĉeestis en entreprenoj aranĝitaj de GEL kaj de GEL-anoj. La samon ni kun ĝojo konstatas pri GEL-anoj.

4. **Administrado.** Ankaŭ tiun ĉi jaron Fr. Slavík akceptis kaj plenumadis funkcion de honora oficejestro. Laŭ lia adreso estis sendataj korespondaĵoj kaj dokumentoj, li dividadis ilin al kompetentaj funkciuloj kaj kontrolis la tutan ιιon de administrado. Laboro de nia oficisto V. Šavel estis por ni tre utila. Li laboris ĝis novembro 1935 en la ejo, kiun ni havis luitan de nia ano konsilisto Koutek. Kiam pro diversaj malregulaĵoj, je kiuj ni ne estis kulpaj, la ejo fariĝis neuzebla por ni, s-o Šavel eklaboris provizore en sia loĝejo. Tiu aranĝo estas provizora kaj ni serĉas novan taŭgan kaj nemultekostan ejon. Kompreneble granda parto de materialo estas ankaŭ en la loĝejoj de ĝenerala sekretario, oficejestro, kasisto kaj prezidanto.

La alvoko de la ĝenerala kunveno por pli intensa partopreno en kolekto por la O f i c e j a f o n d a ĵ o havis resonon kontentigan. Laŭ la listoj aperintaj sur p. 47 de la pasint-

jara Bulteno kaj en tiu ĉi numero sur p. 18 ĝi atingis en fino de la jaro Kč 2613·30. Ĉiuj donacintoj akceptu nian sinceran dankon. Krom la du cititaj listoj aperis la nomaro de donacintoj ankoraŭ en Bultenoj 1934 (p. 2) kaj 1935 (p. 6). Ilia relego estas tre rekomendata al la klubaj funkciuloj. Ili vidos, ĉu ilia grupo jam donacis sumon respondan al ilia graveco kaj riĉeco.

Elprovita sistemo de divido de laboro en komisionoj estis konservita ankaŭ en tiu ĉi jaro. La listo de la komisionoj kaj iliaj estroj estas sur p. 26. Al la citita listo estu aldonite, ke V. Echtner redaktis por Bulteno „Lokajn informojn" kaj aliajn tekstojn. Estas fakto ĝojinda, ke aperis inter ili tri novaj nomoj. Ankoraŭ pli ĝojinda estas fakto, ke ankaŭ tiuj novaj kunlaborantoj restis en siaj funkcioj dum la tuta jaro kaj ke oni aŭdis kaj legis pri ilia laboro. Dum la jaro anoncis sin por gvido de la Studenta sekcio s-o Ing. St. A. Veselý en Brno XVI., KSK. Ni esperas, ke dum la venonta jaro Studenta sekcio de EAĈSR reviviĝos.

Unu nia skribmaŝino estis ĉe la prezidanto, la dua kaj multobliga aparato en la oficejo por V. Šavel.

Sumo da forsenditaj leteroj kaj poŝtkartoj estis 2221, da presaĵoj 3061. En la jaro antaŭa estis la interrespondaj nombroj 1957 kaj 3542. La nombro de forsenditaj ekzempleroj de Bulteno ne estas enkalkulita. Oni vidas konstantan kreskon de nia korespondado. Ankaŭ tio estas dokumento de vivanteco de nia asocio.

5. **Ekspozicia materialo** (komisionestro E. Beran). La tuta materialo estas nun ĉe E. Beran en Lázně Bělohrad, kiu ĝin administras helpata de la E. Klubo. La administrantoj komencis ordiĝi la materialon laŭ la enhavo kaj uzebleco kaj faris jam grandan parton de la laboro. Grava malhelpo estas, ke mankas taŭgaj bret-ŝrankoj por konservado de tiu materialo, ĉar ĝi estas tre ampleksa kaj ne tute facile ordigebla. La materialo estis pliriĉigita per fotografaĵoj, kiuj parte kolektiĝis ĉe la estraranoj, parte estis donacitaj de la prezidanto el lia privata kolekto. Por konservi tiujn ĉi fotografaĵojn la administrantoj prizorgis albumon, en kiun ili surgluis la fotografaĵojn. Tiamaniere estis komencita albumo de ĈAE. Estus tre bele, se de nun ĉiuj samideanoj sendu ĉiun foton, kiun ili faris pri esperantistaj vivo kaj entreprenoj, al Klubo en L. Bělohrad, por ke ĝi povu enmeti ĝin en tiun albumon. Povus rezulti el tio grandioza dokumento pri nia laborado. Partoj de la materialo estis pruntitaj por ekspozicioj en Olešnice n. M., Kladno, Uherské Hradiště, Č. Třebová, Dolní Bousov, L. Bělohrad. Al Moravský Krumlov estis donacita kolekto de gazet-kajeroj. Ĉar la materialo revenas el ekspozicioj parte tre difektita, estas daŭre bezone anstataŭi ĝin. Ni tial ĉiam kun danko akceptas ĉiujn esperantaĵojn por tiu ĉi celo taŭgajn. Tre utila donaco estus por ni ŝranko. Ĉu iu samideano ne povus donaci ĝin? Ankaŭ malnova facilanime malhavebla meblo estus kun danko akceptita en L. Bělohrad.

6. **Informado pri esperantistaj entreprenoj.** Ankaŭ en tiu ĉi jaro ni povas denove konstati, ke kreskis nombro de lokoj, pri kiuj ni povis raporti en nia Bulteno. Tio estas nerefutebla pruvo, ke ankaŭ dum tiu ĉi jaro kreskis aktiveco de nia movado kaj same la konvinko de esp-istoj, ke organizita laboro estas nepra kondiĉo de sukceso en nia klopodado. Ni konstatas tion ne sen speco de kontenta fiereco. Ni vidas en tio rezulton de nia daŭra predikado kaj de niaj konstantaj alvokoj kaj petoj. Tial ni ankaŭ hodiaŭ donas tie ĉi liston de lokoj, pri kiuj ni raportis en la jaro 1935. Komparu tiun ĉi liston kun nomaroj pasintjaraj! Vi vidos, kie ekdormis la agantoj kaj kie ili vekiĝis. Ĉiu el ni provu vekiĝi ekdormintojn! Aš, Bakov n. J., Blatná, Bor u Č. L., Božkov u P., Bratislava, Brno, Budyně n. O., Bystřice n. O., Bystřice u P., Č. Lípa, Č. Třebová, Č. Budějovice, Děhylov, Děčín, Dolní Bousov, Frýdek, Františkovy Lázně, Fryštát, Gelnice, Hluk, Holešov, Horní Bojanovice, Horní Litvínov, Horní Rokytnice, Hrabová, Hradec Králové, Cheb, Chrastava, Jablonec n. N., Jáchymov, Jaroměř, Josefov, Kaplice, Karlovy Vary, Kladno, Kostelec n. O., Klimkovice, Kolín, Kopřivnice, Košice, Krnov, Kunovice, Kutná Hora, L. Bělohrad, Lazy, Lhotka u L., Liberec, Litoměřice, Lubná, Lyžbice, Maffersdorf, Ml. Boleslav, Mnichovo Hradiště, Mor. Ostrava, Mukačevo, Nové Zámky, Nový Bohumín, Nový Jičín, Olešnice n. M., Olomouc, Opatovice, Orlová, Opava, Plzeň, Poruba, Praha, Prešov, Prostějov, Přerov, Radvanice, Ropice, Rychnov n. K., Slezská Ostrava, Sloup, Stará Role, Staré Město u U. H., Staré Sedlo, Stonava, Svitavy, Tanvald, Tisovec, Trnava, Třebíč, Třinec, Turnov, Ústí n. L., Uherský Brod, Uherské Hradiště, Varnsdorf, Vejprty, Vítkovice, Vlž-

ňov u M., Znojmo, Žilina. Sume 96 lokoj. En la jaro 1934 enhavis tia listo 85 lokojn, en 1933 lokojn 66.

7. **Varbado de membroj.** La aranĝo kun la lokaj grupoj, laŭ kiu grupoj aliĝintaj korporacie pagas po membro sole 12 Kč anstataŭ 16 Kč kondiĉe, se ili havas almenaŭ 8 membrojn, daŭris ankaŭ en tiu jaro kaj validos laŭ statuto de EAĈSR ankaŭ en la jaro 1936. Tiu aranĝo certe ne faciligas la administradon de la membroj, sed ĝi signifas gravan apogon de la laboro kaj situacio de la lokaj grupoj. Estis en jaro 1935 korporacie aliĝintaj grupoj en Bakov n. J., Bratislava, Brno (Klubo kaj TRAKT), Dol. Bousov, Hradec Králové, Holešov, Jaroměř, Kolín, Košice, L. Bělohrad, Ml.Boleslav, Mnich. Hradiště, Olomouc, Pardubice, Plzeň, Praha, Přerov, Prešov, Prostějov, Mor. Ostrava, Turnov, Uherské Hradiště, Žilina. Ni devis streki grupojn en Lom u M. kaj en Tisovec, kie la nombro de anoj falis pro diversaj kaŭzoj. Aliĝis nove grupoj en Dolní Bousov, Uherské Hradiště, Mnichovo Hradiště kaj Moravská Ostrava. Do restis la nombro de korporacie aliĝintaj grupoj preskaŭ senŝanĝe 24. Malgraŭ tio, ke la kasisto tre zorge korespondis kun ĉiuj tiuj grupoj, ne pagis ĝis fino de decembro ĉiuj kaj kelkaj pagis ne por ĉiuj membroj. Ni kredas firme, ke la nefinpagintaj grupoj pagos ankoraŭ ŝuldantajn kotizojn. El tio rezultos ankoraŭ kresko de la membro-nombro en la sekvanta alineo. La nombro de la korporacie aliĝintaj grupoj ne estas kontentiga. Ni firme kredas, ke ilia nombro kreskos kaj ke EAĈSR finos kun pli granda cifero tiurilata. Ankaŭ tiun ĉi jaron ni finas kun kresko de la membraro. — Grava afero por ni estas ne sole varbi, sed ankaŭ teni la membrojn. Ni zorgis pri tio ne sole respondante al venantaj korespondaĵoj kaj instigante per niaj cirkuleroj, sed ankaŭ vizitante kelkajn grupojn. Tion faris precipe kasisto Friedrich (Prešov, Žilina).

8. **Administrado de membroj.** Tiun ĉi jaron ni administradis ne sole niajn anojn, sed ankaŭ UEA-anojn el Ĉeĥoslovakujo. Tiun laboron plenumadis oficejo, ĝenerala sekretario kaj kasisto. Estas ĝojiga rezulto de la laboro, ke nombro de UEA-anoj ne tro malkreskis malgraŭ tre malfavora situacio. La apuda statistiko pri nombro de nia anaro en 1935 estas farita de s-o V. Ŝavel.

| | |
|---|---|
| 1 | honora membro |
| 3 | dumvivaj membroj |
| 678 | membroj pagintaj por la jaro 1935 |
| 682 | stato de membroj la 31-an de dec. 1935 |
| 668 | stato de membroj la 31-an de dec. 1934 |
| 14 | kresko t. e. 2·09%. |

Laŭloka divido de la membroj:

| | |
|---|---|
| 88 | Praha |
| 43 | Brno |
| 42 | Košice |
| 40 | Lázně Bělohrad |
| 30 | Uherské Hradiště |
| 24 | Hradec Králové |
| 22 | Bratislava |
| 20 | Kolín |
| 19 | Mladá Boleslav |
| 15 | Dolní Bousov |
| 14 | Bakov nad Jizerou |
| 12 | Mor. Ostrava-Vítkovice |
| 40 | po 10 en: Josefov-Jaroměř, Olomouc, Přerov, Turnov |
| 9 | Mnichovo Hradiště |
| 16 | po 8 en: Holešov, Pardubice |
| 10 | po 5 en: Komárno, Plzeň |
| 8 | po 4 en: Lom u Mostu, Teplice-Šanov |
| 30 | po 3 en: Bystřice p. H, Černilov, Č. Lípa, Č. Budějovice, Lazy, Tábor, Tisovec, Trnava, Třebíč, Zlín |
| 52 | po 2 en: Berehovo, Červený Kostelec, Česká Skalice, Karvinná, Kladno, Kutná Hora, Liberec, Louny, Lubná u Litomyšle, Mukačevo, Náchod, N. Zámky, Písek, Police n. Met., Probulov p. Orlík n. Vlt., Příbram, Rim. Sobota, Rychnov n. K., Stará Paka, Trenčín, Vyškov, Záblatí u N. Bohumína, Zlaté Moravce, Zvolen, Želetava, Železník p. Revúca |
| 144 | po 1 membro en diversaj lokoj |
| 678 | membroj pagintaj por jaro 1935 (inkluzive studentoj en nombro de 22). |

El la listo estas vidate, ke ne ĉiuj grupoj aliĝintaj korporacie pagis ĝis fino de decembro por ĉiuj siaj anoj. Ni turnas nin al ili ankaŭ el tiu ĉi loko kun peto pagi la koncernajn sumojn plej baldaŭ. Tio plibonigos la finan nombron, ne kontentigan ĝis nun.

Studo de la listo kaj komparo kun ciferoj pasintjaraj estas tre instrua. Tiun ĉi jaron ni volus atentigi pri la bela nombro de niaj anoj en Brno. Dum multaj jaroj ni kaj niaj funkciuloj senrezulte korespondis kaj traktis kun espistoj el Brno pri bezono aliĝadi kaj varbadi al nia Asocio. Nia funk-

ciulo eĉ ĉeestis en kunveno de E. K. en Brno, kie oni diskutis pri utileco aliĝi al nacia centro kaj estis prononcataj argumentoj kontraŭ tiu utileco. Efektive dum tiuj jaroj la movado en Brno dormetis. En la lastaj jaroj trovis samideanoj en Brno sferon de agado, kie ili havas eminentajn sukcesojn. Sen plua agado saltis supren nombro de asociaj anoj en Brno kaj neniam de tiu tempo ni aŭdis el Brno demandon, ĉu estas utile aŭ taŭge aliĝi al Asocio. Tiu konstato estas lerniga por multaj. Trovu al vi, samideanoj, sferon de agado, tuj vi komprenos utilecon de nia ekzisto kaj agado.

9. **Publikiga agado.** De Bulteno ni eldonis 6 numerojn, kune 56 paĝojn, 4-paĝan aldonon kaj 4-paĝan kovrilon. Redaktis ĝin D-ro Kamaryt, D-ro Pitlík, O. Ginz, responda redaktoro estis Fr. Slavík. Administron kaj ekspedon prizorgis nia oficejo. Ricevas la Bultenon senpage ĉiuj niaj membroj, kiuj estas per ĝi detale informataj pri nia agado kaj tre ŝatas tiun aranĝon. Ni sendadis tiun ĉi jaron la Bultenon al relative tre granda nombro de adresoj, esperante, ke la ricevantoj, neresenditaj ĝin, pagos fine la asocian kotizon. Tre multaj ankoraŭ ne plenumis nian esperon kaj ne konfirmis nian fidon. Ni tamen fidas, ke granda parto de ili tion faros tamen ankoraŭ, kaj ni turnas nin al ili kun ĝentila peto pagi la asocian kotizon, almenaŭ post fino de la jaro. Legu la Bultenon, vi konvinkiĝos, ke la kotizo estas postulata por bona laboro kaj ke kun la sumoj kolektitaj ni bone mastrumadis.

La Bulteno kostis sume Kč 4059·15.

Krom la Bulteno ni eldonis aparte:

| | |
|---|---|
| Prezaro de esperantaj insignoj . | 500 ekz. |
| Poŝtkarto kun stelo . . . . . . | 3000 „ |
| Speciala n-ro de Bulteno ĉeĥa-esp. | 5000 „ |
| Jeden jazyk pre celý svet . . | 10000 „ |

De ciklostilitaj cirkuleroj ni eldonis sume 26. (En antaŭa jaro 22.) Sumo da paĝoj estis 41. (Pasintjare 25.) El tio estas de la Gazetara servo 6 paĝoj. Sumo de faritaj ekzempleroj estis 3585, la plej granda eldoncifero 500, la plej malgranda 26. En pasinta jaro estis tiuj nombroj 1858, 200, 30.

10. **Kontakto kun ĉs. oficialaj aŭtoritatoj.** Kancelario de la prezidento de la respubliko 9-an de majo konfirmis kun danko saluttelegramon senditan al prezidento Masaryk el nia ĝenerala kunveno. Novan prezidenton d-ron Beneš ni salutis per letero, represita en esp. traduko sur unua paĝo de nunjara Bulteno. — Generale estis tiun ĉi jaron nia kontakto kun ĉs. oficialaj aŭtoritatoj vigla. Kaŭzis tion ofta bezono informi centrajn ŝtatajn oficojn pri diversaj niaj kurantaj entreprenoj kaj postuloj. Al nia kongreso en Brno sendis, respondante al nia invito, leterojn Estraro de ministraro kaj ministerioj eksterlanda, lerneja, komerca. Post kongreso ni sendis kongresajn rezoluciojn al ministerioj komerca, fremdlanda, lerneja, poŝta, kaj al Radio-journal. Meritas mencion, ke la salutleteroj de ministerioj al la kongreso estis malpli koncizaj ol al la kongreso en Olomouc. De ministerio fremdlanda ni ricevis subvencion (2000 Kč) por Ĉeĥoslovaka antologio. Niaj tiucelaj petskriboj al ministerio lerneja kaj ministeria estraro restis sen rezulto. — Vicprezidanto Pitlík atentigis nian legacion en Roma pri la kongreso kaj utileco prezentiĝi sin ĉe la kongreso. Tiun ĉi fojon sen rezulto. — Precipe detalaj informoj povis esti donitaj en personaj interparoloj kun gvidaj oficistoj en ministerio fremdlanda de ĝen. sekr. Ginz 10-an de aprilo kaj en ministerio lerneja de prez. Kamaryt 5-an de novembro. D-ro Pitlík intervenis en ministerio fremdlanda.

11. **Kontakto kun nia centra organizo.** Nia prezidanto estas estrarano de UEA. Ni estas en daŭra kontakto kun ĝia Centra oficejo kaj regule ĝin informas pri stato de organizo en nia lando kaj pri stato de laboroj propagandaj. La 16-a numero de Interna cirkulero por estraro enhavis kiel aldonon 6-an numeron de nia Bulteno kun statuto de EAĈSR. La paskan kunvenon de UEA-estraro d-ro Kamaryt ne ĉeestis persone, sed sendis al ĝi detalan raporton perletere. La kongreson en Roma salutis en nia nomo nia vicprezidanto d-ro Pitlík, kiu estis elektita vicprezidanto de la kongreso. Vizito de niaj anoj en la kongreso estis tre kontentiga. Kiam nia komitatano Kožený ne povis gvidi projektatan karavanon al la kongreso, li transdonis la aliĝojn al li venintajn al Robert Bloch, kiu tre sindone zorgis pri komune vojaĝantaj ĉeĥoslovakoj. Ni aligis ĉiujn niajn membrojn al UEA. Ni funkciis dum la jaro kiel enkasigantoj kaj administrantoj de aktivaj membroj de UEA en nia lando kaj dediĉis nin al konservo kaj plua varbado kun granda fervoro. Tiu laboro estis farata plejparte de oficejo, ĝenerala sekretario kaj kasisto. Ĝi kaŭzis al ni multan zorgon, ĉar estis bezone krei de komenco

kaj sisteme. En la venonta jaro marŝos tiu laboro jam pli regule kaj pli facile. Ni firme esperas, ke nombro de UEA-membraro en nia lando denove kreskos baldaŭ. Komisionon por Radio kaj Komisionon por Gazetaro ni informis pri rezultoj atingitaj en nia lando.

Nian kongreson en Brno salutis en nomo de UEA ĝia estrarano, kortega konsilisto Steiner, veninta el Wien por tiu celo speciale. Li akceptu nian dankon ankaŭ sur tiu ĉi loko.

Laŭ decido de nia komitata kunveno de 29. IV. ni protestis ĉe UEA pro enmeto en revuon „Esperanto" (decembro 1934) de la artikolo „Germana vidpunkto pri la rasproblemo", ĉar ni vidis malakordiĝon inter tendenco de tiu artikolo kaj tendenco de neŭtraleco, kiun ni proklamas idea bazo de nia organizo de la movado. Laŭ decido de nia komitata kunveno de 5. XI. ni informis estraron de UEA pri observoj kaj kritikoj esprimitaj de nia reprezentanto en U. Kongreso en Roma, d-ro Pitlík. Ni esprimas nian konvinkon, ke kondiĉo por pli bona sukceso de la kongresoj estontaj estas, ke kongreso ne estu entrepreno turista, sed esperantista.

Plenumante decidon de la kongreso en Brno, ni ripetis inviton al UEA, ke Universala kongreso en 1838 aŭ 1939 estu en Praha. UEA jam konfirmis nian inviton kaj sendis la kondiĉojn. Ni transdonis la leteron al nia E. K. en Praha, por ke ĝi komencu tuj la preparajn laborojn. Temas precipe pri invito de iu grava oficiala aŭ duonoficiala institucio al UEA.

Al I. Esperanto-Muzeo en Wien ni donacis du malnovajn presaĵojn (unua eldono de „Espero" kaj 1-a n-ro de Bohema espisto), kiujn ni ricevis de d-ro Kamaryt, kaj la du gvidlibrojn eldonitajn de fervoja ministerio. Ni estas membro de I. E. Muzeo depost kelkaj jaroj. Nia prezidanto estas ĝia dumviva membro. Estas relative granda nombro de Muzeo-membroj el nia lando. La kotizo estas relative tre alta (20 a. ŝilingoj por membro dumviva aŭ por dek jaroj de jura persono), ĉar la kotizo signifas nuran subtenon al la muzeo. Signifo de la Muzeo por propagando ĝis nun estas unusole en tio, ke oni povas citi ĝin. Tial ni rigardas nia devo diri tie ĉi publike jenan fakton: Ni petis per letero de 2-a de junio 1935 la Muzeon, ke ĝi sendu al ni kolekton de aŭstriaj turistaj esperanto-presaĵoj, kiujn ni bezonis por prezenti al unu nia oficiala loko. Estas nekredeble sed vere: ni ne ricevis ĝis nun eĉ unu vorton de respondo. Estas nia devo paroli pri tiu seniluziĝo publike. Ankaŭ inter esperantistoj devas validi la principo, ke tiu, kiu kolektas kotizojn, devas senti devigon plenumi kiel moralan devon tion, kion oni rajte povas atendi de li.

12. **Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj.** Ni bedaŭras, ke ni ne sukcesis konvinki ĉiujn gvidantojn de GEL pri nepra bezono eniĝi en unusolan Esperanto-Asocion en Ĉehoslovaka respubliko, kvankam en kongreso en Brno ankaŭ germanoj pledis por tia novaranĝo de organizo en nia lando kaj akceptis funkciojn en la komitato. Ni tre sincere bedaŭras, ke ni devas labori sen ili, sed ni fidas firme, ke la rezultato de nia klopodo pruvos, ke ni faris utilan decidon por organizo de la movado enlande kaj internacie. — Nian lastjaran raporton ni sendis laŭ nia kutimo kaj kun scio de UEA al ĉiuj naciaj societoj alilandaj. Konfirmis ĝian ricevon asocioj Brita, Estona, Franca, Hungarlanda, Jugoslavia, Nederlanda LEEN, Nederlanda E-gruparo, Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo, Bostona Esperanto-Societo. Ni ĉiam kun granda plezuro legas raportojn de la samideanaj naciaj asocioj por ĉerpi el ili instigojn por nia agado. Tial ni ankaŭ tiun ĉi raporton sendas denove al ĉiuj naciaj societoj petante ilin legi ĝin kaj diri al ni siajn opiniojn aŭ sendi siajn raportojn. Al fremdlandaj societoj salutintaj nian lastan ĝeneralan kunvenon aŭ kongreson en Brno ni dankis letere kaj informis interesantojn pri la decidoj. — Niaj konstatoj en la lasta raporto pri vojaĝantaj almozpetantaj esperantistoj kaŭzis tre instruan kaj informan korespondon kun unu nacia asocio, kiu multon klarigis en tiu fako. — Ni salutadis perletere diversajn esp-istajn entreprenojn en fremdlando, al kiuj ni ricevis invitojn.

13. **Lernejaj aferoj.** Por kontraŭstari la nefavoran sintenon de la lerneja administro, la komisionestro verkis detalan kaj dokumentitan memorandumon, kiu estis antaŭ nelonge prezentita al ministerio lerneja. Li faris ankaŭ longajn parolajn klarigojn al ĉefo de ministeria kancelario. — Al Centra societo de instruistaj unuiĝoj en lando Moravisilezia (Ústřední spolek jednot učitelských v zemi Moravskoslezské) ni sendis ĉeĥan tradukon de kongresa protokolo pri lernejaj aferoj. — Ekzamenaj komisionoj por burĝaj kaj popolaj lernejoj ekzamenos laŭ malnova regularo lastan fojon en aprilo 1936. Tio

estas lasta termino por „ŝtataj“ ekzamenoj pri espo. Ni provas, ke tiu ĉi aranĝo estu konservita. Al niaj alvokoj, ke instruistoj-samideanoj uzu la lastajn eblecojn, estis respondite de ili kontentige. — Devas esti tie ĉi enskribitaj du ĉeĥlingvaj verkoj de niaj anoj, kiuj turnas sin ekskluzive al lernejo: Libro de J. Šupichová „Esperanto, ĝia evoluo kaj signifo por nacia lernejo“ (E-spo, jeho vývoj a význam pro národní školu) eldonitan de tre grava eldonejo Unie en Praha. Artikolo de T. Kilián „Esperanto kaj ĝia kreinto“ (Esperanto a jeho tvůrce) aperinta en jarraporto 1934/5 de la Komerca Akademio en Třebíč.

14. **Propagando ĝenerala.** La plej granda faro tiujara estis certe la kongreso en Brno. Meritas dankon ne sole la aranĝantoj de tiu grava manifesto, sed ankaŭ la esperantistoj nialandaj, kiuj partoprenis ĝin grandnombre, kvankam la tempo ne estis tro taŭga. La resono de la kongreso en la preso, ĉe la publikjuraj korporacioj kaj publika opinio estas rimarkinda. Bedaŭrinde la rezulto aperonta en novaj aliĝoj kaj sin-anoncoj por kunlaboro estas preskaŭ same malgranda, kiom post la kongreso Olomouca. — Propaganda semajno aranĝita de ni en la jam tradicia unua semajno oktobra havis rezulton kutiman. Niaj cirkuleroj rekomendantaj ĝian aranĝon dissendataj post la libertempo estas por pluraj lokaj grupoj grava instigilo ĉe komenco de la laborsezono eklabori propagande. La respondoj, kiujn ni ricevas en diversaj jaroj, konvinkas nin pri utileco de tiu ĉi aranĝo, ĉar la respondoj kaj informoj venas ĉiam pli multaj. La aranĝo de Propaganda semajno estas nun en interkonsento kun decido de UEA-komitato en Stockholm, kiu rekomendis ĝian aranĝon. Ni sendis al UEA-centra oficejo en Genève 10 ekz. de niaj cirkuleroj pri prop. semajno, por informi la UEA-estraron pri nia metodo en tiu ĉi fako. — Pri publikaj kursoj ni povas ankaŭ tiun ĉi jaron ripeti, ke intereso pri ili ne estas granda kaj ke precipe en grandaj urboj la rezulto ne estas proporcia al la farita laboro kaj perdoj financaj. Ni faris statistikon ankaŭ pri jaro 1935. Laŭ informoj, kiujn ni povis ricevi, estis dum tiu jaro en nia lando en 52 lokoj 64 kursoj por komencantoj kun sume 1640 kursanoj. En j. 1934 estis en 58 lokoj 80 kursoj kun 1240 kursanoj. La diferenco ne estas grava. Bedaŭrinde ofte estas la informoj, kiujn ni ricevas pri la kursoj, tre nekompletaj. Tial ni eldonis kaj en la lasta tempo dissendis specialan demandaron pri la kursoj kaj petas ĉiun aranĝanton de la kurso postuli ĝin de ni kaj plenigi ĝin laŭ vero. Ĉar ĝenerale spertoj pri la publikaj kursoj aranĝataj laŭ la ĝisnuna maniero ne estas tro kontentigaj, ni decidis provi aranĝon kun Cseh-metoda instruisto. Ni jam invitis bone rekomenditan samideanon H. Seppik, estonon, kiu jam komencis labori en Košice kaj Prešov. Ni atentigas ĉiun leganton pri niaj invito kaj klarigo en la unua numero de Bulteno kaj tre rekomendas provi la aranĝon en ĉiu loko, kie estas malmultaj esperantistoj. — Ni daŭrigis en disvendado de ŝlosiloj slovaka kaj ĉeĥa kun rimarkinda sukceso. Precipe meritas esti enskribite, ke en tiu jaro ni sendis proponon pri aĉeto de la slovaka ŝlosilo por publikigo al 107 redakcioj de slovakaj gazetoj, kiuj plejparte publikigis ĝin. La ĉeĥan ŝlosilon liveradis al ni Ĉs. E-Instituto je rabatita prezo. Estas espereble, ke malnova provizo estos baldaŭ elĉerpita. Tio ebligos aperigon de nova eldono laŭ normo de UEA. — Disvendado de ĉeĥa Jeden jazyk marŝis bone, granda parto de la eldonkvanto estas jam inter la publiko. Ĵus ni eldonis ankaŭ slovaklingvan eldonon, kies tekston tradukis nia vickomitatano J. V. Dolinský. Ĝia teksto estas kompletigita per informoj pri kelkaj gravaj rezultoj de la movado el la plej lasta tempo. — Teksto de la propaganda prelego estas daŭre je dispono de la interesantoj. Ĝi estas malofte postulata. Tiun ĉi jaron eĉ ne unu foje. — Niaj flagoj estis uzitaj en L. Bělohrad dum la Regiona konferenco kaj en Brno dum la kongreso. — Plurfoje estis tiun jaron bezone korespondi kun redakcioj pri occidental. Sed ĉar la argumentoj de la occidentalisto restas daŭre sen ŝanĝo, estas ilia refuto relative facila. — Nia adresaro de interesantoj pri esp-o estas konstante kompletigata. Sed neniam ni povas ne ripeti nian insistan peton, ke ĉiuj aktivaj samideanoj sendu al ni daŭre adresojn de ĉiuj interesantoj pri nia lingvo, ĉar utileco de tia adresaro estas ekskluzive en ĝia detaleco. — La Skriba kurso, pri kiu ni parolis antaŭ jaro, pro specialaj kaŭzoj ne povis estis ankoraŭ eldonita. Sed ni ne forgesas tiun ĉi projekton. — Ni povis plurfoje donaci lernolibron, ŝlosilojn aŭ alian varban literaturon al gravaj personoj, kiuj devus esti informitaj pri nia idearo. Ni sendas senpage nian Bultenon al la granda studenta legejo en Akademický dům en Praha, kiu petis pri ĝi. — Venas

relative ofte demandoj de homoj, kiuj ekinteresiĝis pro nia diversmaniera agado kaj publikigado. Por ilin informi koresponde ni havas apartan ciklostilitan leteron, kiun ni sendas kun diversa materialo.

15. **Propagando per gazetoj.** (Komisionestro O. Ginz). Gazeta servo dediĉis nunjare speciale sian atenton al regionoj, kie ne montriĝis ĝis nun sufiĉa intereso por nia lingvo kaj kie ne estas organizitaj esperantistoj. Tie ĝi ne povis uzi la servon de la kunlaborantoj, sed ĝi turnis sin rekte al la redakcioj. Estas notinde, ke tiu agado havis eksterordinaran sukceson. La redakcioj ne sole represis la artikolojn (ili enhavis ĉefe atentigon pri niaj propagandaj eldonaĵoj), sed ili alsendis ofte ankaŭ pruvekzempleron. Precipe bonan komprenon montris la gazetoj en Slovakujo, kiun landon ni post la pasintjaraj rezultoj devis speciale atenti. Kaj la represon sekvis tre multnombraj leteroj de legintoj el regionoj kaj fakoj (ĉar ankaŭ fakajn gazetojn ni prilaboris), en kiujn ni antaŭe ne enpenetris sufiĉe. Tiu provo ne estis senofera, ĉar ni liveris al pluraj centoj de redakcioj kun akompana letero senkoste la ŝlosilon kun propaganda literaturo. — Gazeta servo havas intencon doni al siaj kunlaborantoj pli ofte materialon, ol ĝi faris tion nunjare. Ĝi konscias, ke la 6 paĝoj da artikoloj dissenditaj en 1935 ne sufiĉas por diligentaj laborantoj kaj ĝi devas danki pro la instigo al tiuj, kiuj post kompleta represo urĝe postulis novan materialon. Tamen Gazeta servo ne povas preteriri la fakton, ke estas inter la anoncintoj iuj, kiuj ne montris signon de sia aktiveco. Al ili estas nun direktata insista peto pri elteno en tiu ĉi gravega laboro aŭ pri informo, ke ili ne povas daŭrigi kunlaboradon. La aktivuloj akceptu klarigon, ke la komisionestro nunjare devis malfacile labori en sia profesio kaj tial ankaŭ ofte foresti el sia hejmo. Ni klopodas fari aranĝon, ke la cirkuleroj de G. S. iradu nun pli regule.

La ciferojn pri la statistiko ni publikigos en la venonta numero de la Bulteno. La nombro de eltranĉaĵoj estas tre granda, tial ilia klasigo bezonas tempon.

La konstantajn gravaj Esperanto-rubrikojn en fakaj gazetoj ni citis en koncernaj alineoj. Tie ĉi estu ankoraŭ aldonite, ke ĉiusemajna kroniko „El Esperanto-mondo", verkata de J. Šupichová en Národní politika daŭras.

16. **Propagando en fakaj rondoj.** Ni disvastigis en 6 fervojistaj gazetoj informon pri la kurso por fervojistoj de la Cseh-Instituto en Haag en majo 1935. En gazeto por fervojistoj ČSD „Zpravodaj zamestnancov" en Bratislava estas unupaĝa E-rubriko pri espo por fervojistoj redaktata de nia ano Charvát. — Kronikoj por instruistoj de J. Šupichová estas en Měsíční zpravodaj, kiu estas de eldonisto Dědourek sendata en ĉiujn lernejojn kaj en revuo de ĉs. instruistinoj List říšského svazu učitelek. Nia komitatano T. Kilián en Třebíč estas reprezentanto por Ĉeĥoslovakujo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj. — Al skolta asocio Svaz junáků ČSR en Praha ni tradukis leteron de la Sveda federacio pri la tendaro de The Rover Moot en Ingarö kaj sendis detalan informon pri la nunjara Internacia tendaro en Ipswich. — Plurfoje ni korespondis pri seriozaj komercaj aferoj. La plej gravaj temis pri eksporto de ĉeĥoslovakaj varoj el Rumanujo, reprezento de ĉs. fabrikoj en Polujo, vendo de hotelo en Monaco. — Ni rekomendas al komercaj korespondantoj la novan verkon de Šupichová Esperantský dopisovatel. — Ni sendis al ĉs. foiroj statistikon pri esp-lingva korespondado de foiro en Lyon kaj rekomendis al ili denovan uzon de esp-o. Respondis foiroj de Praha kaj Bratislava sed sen iu ajn firma promeso. Do restas sole ĉiam la foiro de Reichenberg, kiu daŭre uzas esp-on dank' al konscia kaj persista laboro de GEL-prezidanto prof. inĝ. G. Scholze. Estas bezone daŭre persekuti tiun ĉi aferon. — Al societo Ochrana en Pozořice ni liveris kelkajn mallongajn tradukojn. — Al soldatoj en Kaplice instruis espon laŭ permeso de Komando I/1 pr. nia fervora ano Borovka, kiu tie militservis.

17. **Propagando fremdlanden.** Al komerca ĉambro en Bucuresti ni skribis pri utileco uzi espon en la komerca rumana adresaro kaj en alia letero ni rekomendis uzon de espo por informi fremdlandon pri dekretoj de Rumana nacia banko pri importo kaj eksporto de valutoj kaj aranĝoj pri devizoj. La redakcio de la adresaro efektive enmetis esperanton inter la lingvojn uzatajn. La leteroj estis verkitaj de ĝen. sekretario Ginz, kies profesia vizito porkomerca en Bucuresti donis al li spertojn necesajn, por ke la letero estu konvinkema. En Svedujon ni povis respondi demandon pri historie gravaj manuskriptoj en universitata biblioteko en Praha. Fakulon pri

folkloro franca ni provis interrilatiĝi kun ĉehoslovakaj interesuloj. Laŭ ricevitaj petoj ni sendis propagandan materialon al pluraj lokoj en Polujo kaj Argentino kaj kun akompana letero al radio-inventisto Marconi Italujon. Ankaŭ dum tiu ĉi jaro korespondis ĝen. sekretario pri Andersen-tradukoj kun la Andersen-Muzeo en Odense kaj liveris al ĝi materialon prizorgitan de diversaj ĉs. institucioj (artista societo, urba teatro en Praha). Al Svedujo ni sendis informojn kaj fotojn pri detaloj de popolaj kostumoj en Slovakujo kaj al alia demandanto pri fantom-legendoj en urbo-domo en Bratislava. Al „Verdemularo" de universitato en Kanton ni respondis al ilia enketo pri konstitucioj de ŝtatoj en la tuta mondo. Ni konfirmadis zorge ricevon de diversaj propagandaj presaĵoj turismaj, komercaj kaj ideaj kaj tre insiste rekomendas al niaj membroj, ke ankaŭ ili respondadu laŭ ebleco al ĉia tia esperantlingve presita presaĵo. Ministerio fervoja sendis laŭ nia instigo 100 ekz-ojn de la gvidlibro „Ĉehoslovakio" al Marista Ligo en Ismailia (Egiptujo). Por ruso en Manĉurio ni trovis adreson de lia parenco en Praha. Ni korespondis sukcese pri pluaj tradukoj de la Aisberg-libro.

18. **Radio** (komisionestro J. V. Šamla). La plej grava fakto estas diskuto pri esperantlingva disaŭdigo dum la kongreso en Brno, kiun ĉeestis kaj vigle partoprenis D. Chalupa, ĉefo de la Literatura sekcio de Radiojournal en Brno, pri kiu estas raportite sur p. 40. La Radio-stacio en Brno eldonas jam la duan jaron ciklostilitan „Ĉehoslovakan radio-bultenon" kun programoj kaj informoj pri la prezentataj verkoj. Nun ĝi eldonis ankaŭ reliefe presitan aldonon por blinduloj. La TRAKTanoj estas en bonega formo. Dum la jaro 1935 estis esperanto-disaŭdigata el Brno 15 foje, el Košice 1 foje, el Moravská Ostrava 24 foje. La disaŭdigoj el Brno estas relajsataj de Praha I. kaj Moravská Ostrava. — La semajna radio-gazeto Týden rozhlasu enhavis dum la jaro 40 foje esperantistan kronikon verkatan de J. Šupichová.

19. **Turismo** (komisionestro Dr. Pitlík). Fervora ministerio eldonis du novajn gvidlibrojn tradukitajn de O. Ginz (v. p. 52) kaj loka Klubo faldprospekton pri Uherské Hradiště. Ni disvastigadis informojn pri tio. — Al ministerio fervoja ni sendis detalan raporton (verkitan de Ginz) pri uzo de espo por turisma propagando de oficialaj kaj duonoficialaj institucioj en ceteraj landoj precipe en Danlando, Finlando, Nederlando, Aŭstrio, Svislando kun aldonitaj specimenoj. — Al ministerioj komerca kaj fervoja, Centro de porfremdulaj asocioj en Praha, Porfremdula asocio Moravi-silezia en Brno ni sendis detalan raporton pri agado de la kongreso en Brno pri turismo. — La dua karavano de fervojistoj gvidita de nia komitatano Friedrich Nederlandon kaj Estona karavano gvidita tra nia lando de Seppik en Italujon (v. p. 53 kaj 54!) vidigis al tre diversaj medioj oficialaj kaj privataj uzeblecon de espo. Por la estona karavano ni sukcesis ricevi de la financa ministerio liberigon de ŝosea kaj transporta impostoj. — Pri la Internacia somerrestadejo en L. Bělohrad estas detala raporto sur p. 44. Kvankam en j. 1935 la vizito ne estis kontentiga pro la kriza epoko en Eŭropo, tamen la aranĝo daŭras kaj ni tre rekomendas al samideanoj, ke ili uzu la tre bonan kaj malmultekostan restadon dum libertempo en tiu ĉi ĉarma kaj tre saniga banloko. — Ankaŭ tiun ĉi jaron estis niaj anoj ofte je dispono al fremdlandaj turistoj-espistoj gvidante kaj informante ilin. Sekvas el la situacio mem, ke la fremduloj venas dum libertempo, kiam niaj komitatanoj estas ankaŭ ekster sia hejmo, precipe ekster Praha. La bezono de oficejo estas por tiu celo precipe evidenta. Dum tiujara somersezono estis funkcio de Šavel tre utila al ni. Sed ni rajtus jam pro unusola tiu ĉi titolo ricevi ejon el publikjura dispono. — Ĉe Klubo turista intervenis en afero de stacidomaj tabuloj dr. Pitlík. — En ciklostilita raporto pri tria komitata kunveno (18. VI.) ni denove avertis niajn klubojn kaj membrojn, ke ili ne subtenu la „m o n d m i g r a n t o j n" uzantajn esperanton, se ili ne posedas rekomendleteron de ĈAE.

20. **Stacidomaj tabuloj.** Aldoniĝis dum la jaro 1935 novaj lokoj kaj 79 tabuloj kun verda stelo atestis dum tiu jaro en la stacidomoj, ke la samideanoj de la lokoj volas esti je dispono de vizitantaj esperantistoj kaj ke ili scias kapti okazon por bonega propagando. Estas jenaj lokoj de la ekstrema oriento de la ŝtato ĝis la okcidenta limo: Aš, Bakov nad Jizerou, Bělohrad, Bohumín, Bor u České Lípy, Bratislava, Brno (6 tabuloj), Česká Kamenice, Česká Lípa, České Budějovice, Dolní Bousov, Georgswalde, Holešov, Hradec Králové, Chust, Kežmarok, Kladno-Výhybka, Kolín, Komárno, Kopřivnice, Košice, Lenešice, Litoměřice (en 2 stacidomoj), Mnichovo Hradiště, Mor. O-

strava-Přívoz, Mukačevo, Nymburk, Otrokovice, Pardubice, Písek, Planá u Mar. Lázní, Plzeň (3 tab.), Police n. Metují, Poprad-Velká, Postoloprty, Praha (en 6 stacid.), Prešov, Prostějov, Přelouč, Rumburk, Senica nad Myjavou, Staré Strašnice, Teplice-Šanov (2 tab.), Tisovec, Trnava, Trutnov, Třebechovice p. Orebem, Turč. Sv. Martin, Turnov, Týniště n. Orlicí, Uherské Hradiště, Užhorod, Varnsdorf, Výlok, Zbečno, Zvolen, Žatec kaj Žilina. Estas bela vico de nomoj, sed ni nepre atendas, ke venos novaj kaj multaj aliĝantoj dum nuna jaro. Temas pri elspezo de 26 Kč por unua jaro, por ĉiu sekvanta 6 Kč. Krome 12 tabuloj servas en diversaj lokoj por anonci klubejojn. Ankaŭ tiu uzo, kiu igas aperi nian stelon en la interno de la urboj, estas tre rekomendinda. Ni liveras por tiu celo la tabulon por unufoja pago de Kč 15'—.

Dum nuna jaro ni ricevis kelkfoje plendon pri tio, ke la mendita tabulo ne venis en la stacidomon. Ni aranĝis pri ĉiu tia tabulo nefacilan kaj sufiĉe kostan esploron kaj krom unusola escepto montriĝis ĉie la plendo neĝusta. Ni preferis ne daŭrigi pri tiu temo la korespondadon, sed ni nun petas la lastajn plendintojn en Písek kaj Chust, ke ili bone rigardu siajn staciojn kaj ili sendube trovos tie la tabulon. Ni havas konfirmon de la koncernaj staciestroj, ke la tabuloj vere kaj sur videbla loko estis fiksitaj. Kaj venonte ĉiu tian plendon bonvolu direkti unue al la staciestro, kiu mem estas devigita aranĝi ĉion necesan, se la tabulo vere perdiĝus el la stacidomo. Kaj post mendo bonvolu interkonsentiĝi kun la staciestro, kie vi deziras la tabulon havi aŭ informu nin kun la mendo pri la dezirata loko.

21. **Informado de fremdlando pri niaj ŝtato kaj nacio.** Ofte niaj anoj havis eblecon informi fremdlandanojn kaj fremdlandajn korporaciojn pri politika kaj ekonomia situacio en nia lando kaj pluraj niaj anoj publikigis diversajn informajn artikolojn en esperantaj gazetoj. Tria numero de „Esperanto" 1935 enhavis okaze de lia 85a naskiĝtago bildon kaj biografion de prezidento Masaryk (de R. Bloch). Prezidanto Beneš ricevis de UEA salutleteron okaze de sia elekto, kaj januara numero de la gazeto „Esperanto" 1936 enhavas artikolon pri li laŭ informoj, kiujn sendis nia prezidanto. Ni sendis la koncernan numeron al prezidenta kancelario. — Vicprezidanto dro Pitlík organizis, ke ĉs. kongresanoj vestu sin en Roma dum taŭgaj okazoj en naciajn kostumojn. La organizo tre sukcesis, la grupo estis ofte fotografata kaj vekiĝis simpatian intereson. D-ro Pitlík ankaŭ zorgis, ke ĉeĥoslovakoj dum kongreso kunvenu kaj atentiĝu tiamaniere pri si publikon italan kaj esperantistan. Fotoj de tiuj grupoj publikiĝitaj en „Ligilo" estas ĉarma dokumento de tiu aranĝo.

22. **Literaturaj aferoj** (komisionestro Dr. T. Pumpr). Ĉeĥoslovaka antologio estas dissendata nur dum januaro kaj februaro 1936. Ni fabrikigis laŭ interkonsento kun la eldonisto Bleier pro diversaj kaŭzoj la ilustraĵojn en presejo en Praha. Sed kiam la bildoj venis Budapeston postulis hungara doganofico tre altan doganon. Rezultis longa traktado pri ebleco ricevi la doganon redonita, kiu bezonis longajn kaj diversspecajn klarigojn kaj intervenojn, kio kaŭzis longan prokraston. Ni ĝojas, ke la afero tamen jam estas finita kaj firme esperas, ke la libro kontentigos multajn. Redakto de la antologio kaŭzis por ni kontakton kun multaj ĉeĥoslovakaj verkistoj kaj eldonistoj por peti ilin pri permeso publikiĝi la tradukojn. Neniujn rifuzojn ni ricevis. Ankaŭ de prezidento Masaryk ni ricevis formalan permeson. La danko, kiun ni esprimis al la kompetentaj verkistoj kaj eldonistoj en la libro, estu ripetita ankaŭ sur tiu ĉi loko. — Ni ankaŭ dum tiu ĉi jaro klopodis kun sukceso kontentiga varbi anojn de AELA kaj dissendis pri ĝi apartan cirkuleron. Ni ripetas sur tiu ĉi loko la alvokon al ĉiuj niaj anoj, ke ili ankaŭ en 1936 restu fidelaj al tiu ĉi grava entrepreno. Kvankam en jaro 1935 la libroj de AELA aperadis tre malfrue kaj neregule, tamen la verkoj jam aperintaj certe tre kontentigas multajn. Kaj estas tre versimila la kredo, ke en nova jaro la ritmo de aperado denove pliboniĝos. Ni tre petas, ke ĉiu esperantisto en nia lando ricevinte la aperontan prospekton respondu al ĝi pozitive kaj aliĝu denove. AELA estas certe unu el la kolonoj de nia movado. — Ni ankaŭ en tiu ĉi jaro sukcese klopodis helpi disvastiĝon de libroj eldonitaj de Moraviaj Esperanto Pioniroj. Tion ebligas al ni nia Libro-Servo. — Ni prizorgis el Egiptujo kaj el aliaj landoj diversajn esperantajn tradukojn el poeto Bezruč por Bezruč-kolekto en Praha. — Ni reprenis daŭrigon de listo de verkoj tradukitaj el ĉeĥoslovaka literaturo. Al nia alvoko sur p. 32 anoncis sin ĝis nun unu kunlaboranto, kiu faris bone sian parton de laboro. — Ni hel-

pis al kelkaj eminentaj ĉs. tradukantoj prizorginte por ili tekstojn, kiujn ili bezonis. — Ĉar ni estas konvinkitaj, ke posedo de biblioteko estas unu el la gravaj taskoj de la lokaj grupoj, ni provis starigi liston de Esperanto-bibliotekoj en nia lando. La unua listo aperis sur p. 53. — En oficiala organo de Asocio de ĉs. libroeldonistoj Rozhledy po literatuře a umění aperis dum la jaro 1935 kvarfoje ĉeĥlingva rubriko „Novaĵoj de Esp. literaturo" de J. Šupichová.

23. **Libroservo** (estro Fr. Slavík). Nia Libroservo fariĝis grava institucio atentata de la membroj, sciantaj taksi la simplan mendon de ĉiuj esperantaĵoj en unu loko. Ili ŝparas tiel korespondadon kaj monsendon al diversaj eldonejoj en- aŭ eksterlandaj kaj donas profiton al la organizo. Ni tre ŝatus vidi, ke la samideanoj ĝenerale uzu la servojn de la Libroservo, kiu hodiaŭ tre akurate povas plenumi la deziron de ĉiu libroaĉetanto. Ĝi havas regulajn rilatojn kun preskaŭ ĉiuj gravaj eldonejoj esperantaj. La financaj rezultoj estas kontentigaj, kvankam pro diversaj malhelpoj verŝajne nur dum jaro 1936 povos esti atingita la necesa firma fundamento. Nunjare ĝi kontentiĝis pri dono de modesta sumo al la Asocia kaso, sed tamen ĝi povis krome igi iom malpli kosta la eldonon de la Bulteno kaj riskis eĉ aĉeti por bona prezo la tutan stokon de la vendeblaj objektoj Asociaj.

24. **Sciencaj aferoj** (komisionestro Kamaryt). Estro de la komisiono estis en daŭra kontakto kun d-ro Wüster pri aferoj de lingva normigo precipe en elektrotekniko. Malgraŭ nefavora sinteno al esperanto de prezidanto de la Elektreteknika Asocio Ĉeĥoslovaka prof. List, ĉeĥoslovaka reprezentanto en kunveno de Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC) Inĝ. Němec ne balotis finfine kontraŭ esperanto, sed detenis sin. Tre verŝajne efikis krom la argumentoj diritaj dum la konferenca traktado ankaŭ nia detala memorandumo verkita de d-ro Kamaryt kaj materialo, kiun ni sendis al la Elektroteknika Asocio. Inĝ. R. Novák en Plzeň estas en tiu ĉi sfero nia konstanta kaj persista kunlaboranto. Dum la jaro aperis de li plua artikolo en „Nová práce" kaj liaj leteroj al Elektroteknika asocio ne povas esti neatentataj, ĉar li estas ĝia membro. Kompreneble ni ne ĉesis persekuti la aferon daŭre. Ankaŭ al Ĉs. normiga societo ni turnis nin kun pluaj klarigaj informoj pri uzo de espo ĉe la Sovetia normiga societo. — Plurfoje ni kritikis, korektis kaj konsilis pri tekstoj por preso. La plej ampleksa estis kritika esploro de d-ro T. Pumpr pri teksto geografia. — Ni sukcesis akiri bezonatajn informojn pri nekonataj Zamenhof-manuskriptoj nun deponitaj en la universitata biblioteko en Jerusalem. — Nia Libro-Servo estas pagejo de I. Scienca Asocio E. por nia lando.

25. **Junularo** (komisionestro V. Echtner). Internaj cirkonstancoj en ĈAE deviĝis la estron okupiĝi per alia por-asocia laboro; tial montras sin en 1935 malampleksiĝo de laboro farata en tiu ĉi fako. Alvenis 21, foriris 18 korespondaĵoj krom 48 varbaj presaĵoj. Malgraŭ tio **tute** ne ĉesis efika agado por veki intereson ĉe gejunuloj: en „Dětská neděle" aperas skriba kurso, laŭ kies sciigo partoprenas ĝin pli ol 630 infanoj. La kurson gvidas O. Mádr en Praha. La elspezojn por afranko de korespondaĵoj pagis plejparte la komisionestro mem. Li akceptu pro tio apartan dankon.

26. **Studentoj**. Ni akceptadis ankaŭ dum la jaro 1935 studentojn por kotizo da sole 6 Kč kaj liveradis al ili la Bultenon. Dum la jaro anoncis sin por funkcio de la studenta komisiono A. Veselý, studanto en Teknika altlernejo en Brno. Ni ĝojas, ke laŭplana agado inter studentoj estos organizita dum tiu ĉi jaro.

Praha 1-an de februaro 1936.

Por Komitato de ĈAE:

**Stan. Kamaryt**, prezidanto. **Otto Ginz**, ĝen. sekretario.

# Ĉu pli bone ne pagi?

Estas tutmonde rekonita vero, ke sistema kaj organizita laboro gvidas pli radipe al la celo. Disaj esperantistoj, eĉ se estos tre multe da ili, apenaŭ plirapidigos la progreson de nia afero. Se ili uzas esperanton, ne estante organizitaj, ili montras mankon de konscienco. Ili ĝuas la frukton de fremda laboro. La organizojn, kiuj ebligas praktikan uzon de esperanto kaj kiuj zorgas pri progreso de la movado, kreis la kotizantaj esperantistoj per siaj kotizoj. Sole ili rajtas prave ĝui la avantaĝojn de internacia lingvo.

Societo, kiu nomas sin esperantista, sed kies kotizo apenaŭ sufiĉas por pagi la lumon en kluba ĉambro, ne kunlaboras sufiĉe en

nia komuna tasko. La societo ne kontribuas sufiĉe, se unusola membro pagas plenan kotizon al la nacia kaj internacia organizoj. Laŭ opinio de la societo ĝi aliĝas tiel al la tutmonda movado elspezante saĝe minimuman sumon kaj tamen ebligante al ĉiuj siaj membroj uzadon de internacia lingvo. Post ioma pripenso trovas la membroj, ke ili ja saĝe trompis, sed ke tiaj societoj ne ebligos la vivon de nia movado. Tion faru la aliaj, la malpli saĝaj. Pagu kaj laboru la aliaj, la aliaj abonu gazetojn, aĉetu literaturon. La membroj de la saĝa societo plendos, ke ili ne havas ĝustatempe la Jarlibron kaj ke la malmultajn aliĝojn al ilia kurso kulpis la nacia societo ne subteninte ilin sufiĉe.

Estas bone ŝpari kaj hodiaŭ pli ol iam necese. Ni komprenas, se ni ricevas informon pri eksiĝo pro manko de rimedoj. Sed ni ĉesas kompreni, kiam ni legas la nomon de la eksiĝinto en la nomaro de partoprenantoj de la tutmonda kongreso. (Kongreso, kiun aranĝas la internacia organizo!) Ne mono mankas ĉe la samideano, sed kompreno kaj konscienco.

Estas multaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio kaj ili ĉiuj konsideru sia devo subteni per kotizo kaj laboro la tutŝtatan kaj per tio ankaŭ la internacian organizon. Ili ne kontentiĝu per sia membreco en la ŝajnaj societoj kun ŝajnaj kotizoj. Kiam temas pri pago, ili ne serĉu pretekstojn por nepago. Ili malemu adicii siajn elspezojn dum sia esperantista vivo, sed ili kutimu dividi ilin. Ili trovos tiel, ke ne estas multe, se ili elspezis por kotizoj 360 Kč dum sia kvinjara esperantisteco, ĉar tio signifas sole 20 helerojn tage.

En la pasinta Bulteno estis aldonita pagilo kun peto pri sendo de la kotizo. Al la jamaj pagintoj ni sincere dankas, al la atento de ceteraj ni rekomendas tiun artikolon kaj ni ripetas ke pagas:

| | |
|---|---|
| Membro de EAĈSR kun senpaga Bulteno | Kč 16·— |
| MJ de UEA kun Jarlibro . . . . . . . | Kč 25·— |
| MA de UEA „ „ kaj kun revuo | Kč 60·— |
| MS de UEA „ „ , revuo kaj libraj premioj . . . . . . . . . . . | Kč 160·— |

Membro aliĝanta samtempe al EAĈSR kaj al UEA rajtas depreni 3 Kč.

Se vi perdis la pagilon, aĉetu en la poŝta oficejo por 5 heleroj t. n. blankopagilon, kiun plenigu per n-ro 9.602 kaj per „Svaz esperantistů, Praha".

**Kluboj aliĝintaj kun ĉiuj siaj membroj al EAĈSR pagas rabatitan kotizon 12 Kč po membro. La klubo devas havi almenaŭ 8 membrojn.**

# Lokaj informoj.

*Aš—Asch.* 8. X. Malfermo de kurso, kiun aliĝis nur 3 komencantoj. Instr. s-o R. Hollerung, laŭ Privat. 7. XII. Zamenhof-solenon partoprenis 20 p.

*Bakov.* Vigla laboro dum la Propaganda Semajno: EK presigis kaj senpage disdonis 1000 flugfoliojn, aranĝis lumreklamon en kino, anoncis kurson per gazetoj; dum 10 tagoj pendis tolaj reklamaĵoj trans la ĉefaj stratoj. — 30. IX. Ĉe-metoda kurso por 15 komencantoj, ĉeĥoj kaj germanoj. Instruas s-o F. Pytloun. — 15. XII. Zamenhofa memorvespero; ĉeestis ankaŭ sam-anoj el Mladá Boleslav kaj Mnichovo Hradiště. — 25. XII. kunveno por adiaŭi s-on F. Pytloun, kiu nun estas en Kukleny; elekto de nova komitato: prez. Fr. Bartoš, vicprez. St. Procházka, sekr. J. Horák, kas. K. Pulcman.

*Bor—Haida.* 27. I. jarkunveno de la loka grupo „Ĉiam antaŭen".

*Brno.* Katolikoj: Preparoj por la venonta internacia kongreso de katolikaj e-istoj, kiu okazos la 4.—8. VIII. 1936. — 31. X. laborkunveno tiucela. La kongresprepara komitato eldonas bultenon „Informilo" en 5000 ekz. Informoj: S-o Aleš Berka, Brno, V Jirchářích 8. Kurson por katolikoj gvidas laŭ Kilian-lernolibro A. Berka, 16 p. — Germanaj sam-anoj kunvenas regule ĉiuvendrede je la 20-a en gastejo Kittel.

*Břeclav.* 6. X. E-ista Rondeto aranĝis unutagan E-ekspozicieton kun fako de moneroj el la Oriento akiritaj per E. La ekspozicion vizitis almenaŭ 50 p. Favoraj gazetraportoj. — 10. X. komencis trimonata kurso por 30 komenculoj. Laŭ propra metodo instruas s-o Ant. Vája, faka instruisto el Charvatská Nová Ves.

*Březová—Brüsau.* 12.—XII. s-o Karger el Svitavy-Zwittau aranĝis kurson por 11 komencantoj germanaj, de li Ĉe-metode instruataj.

*Cvikov-Zwickau.* Regulaj kunvenoj la 4an vendredon ĉiumonate je la 20a en gastejo „Sonne".

*Česká Kamenice—Böhm. Kamnitz.* 16. X. malfermo de kurso. Regulaj kunvenoj ĉiumerkrede je la 20a en hotelo „Post".

*Česká Lípa—Böhm. Leipa.* Regulaj kunvenoj la unuan mardon ĉiumonate. La unua kurso por ĉeĥoj en tiu ĉi loko havas 15 p., kiujn instruas s-o J. Hanuš, del. de UEA.

*Česká Třebová.* Rondeto de amikoj de E. aranĝis la 11. X. paroladon pri la Univ. Kongreso en Romo kaj diskuton pri propag., kurso kaj fondo de EK aliĝonta al la nova tutŝtata centro. — 5. XI. malfermo de kurso.

*Darkov.* Kurso de REL depost 1. XI., 16 polajn komencantojn instruas Ĉe-metode s-o T. Niemec el Karvinná.

*Děčín—Tetschen.* Regulaj kunvenoj ĉiun duan merkredon je la 20a en gastejo „Bürgerstübl".

*Dobrovice.* Ekspozicio kaj kurso en aŭtuno 1935.

*Dolní Bousov.* 18. IX. paroladoj de Dro Vaněk kaj prof. Kožený ĉe malfermo de kursoj; konversacian por 20 p., kiu daŭros 7 monatojn, gvidas Dro Vaněk laŭ lernolibro Kilian, komenculan kurson, kiu estas daŭronta 10 monatojn, gvidas por 35 infanoj faka instruisto Al. Bobek laŭ propra metodo. Dum sia malferma parolado prezentis prof. Kožený el Ml. Boleslav Ĉe-metodan provlecionon.

*Drahovice—Drahowitz.* Laŭ oficiala informo ĉesis ekzisti en septembro 1935 la loka E-grupo pro manko de membroj.

*Dubí apud Kladno.* 3. XI. malfermis „Osvětová a kulturní komise obce Dubí" dumvintran kurson. 12 p. instruas laŭ Šupichová f-ino B. Vlčková kaj s-o Fr. Litera dimanĉe antaŭtagmeze.

*Frýdek.* 3. X. E-Societo malfermis novan kurson.

*Fryštát.* 1. X. malfermiĝis kurso de REL por 30 komencantoj: ĉeĥoj, germanoj kaj poloj. Instruas Ĉe-metode s-o Em. Sebera.

*Hradec Králové.* EK malfermis la 25. IX. sesmonatan konversacian kurson. 20 p. instruas laŭ Ĉe-metodo s-o V. Černý.

*Jablonec n. N.—Gablonz a. N.* 21. IX. propagandan kunvenon en Maffersdorf aranĝis la loka grupo „Izermontaro".

*Jaroměř.* Eksterregula ĝenerala kunveno de la EK 21. XI. aprobis jenan dividon de la funkcioj: Prez. Dro A. Konečný, sekr. Fr. Páv, kas. Sedlák, bibliot. K. Holeček, vicprez. Fr. Hofmanová, reviz. Fr. Fleischer. Kurso kun 10 partoprenantoj.

*Kladno.* I. X. malfermo de kurso.

*Kolín.* 5. XI. malfermiĝis kurso. 24. I. jarkunveno.

*Košice.* 20. I. al Ĉe-metodaj kursoj de estona s-ano H. Seppik aliĝis pli ol 80 p. La kursoj okazas: por komencantoj ĉiulunde kaj ĉiuĵaŭde, perfektiga kurso ĉiumarde kaj ĉiuvendrede, ambaŭ je la 19—21a kaj daŭros 8 semajnojn. — La urbestraro ree donis subvencion 150 Kč al E. K. por 1935.

*Krnov—Jägerndorf.* 4. XI. perfektiga kurso por 33 p. en „Stadtkaffee"; gvidas s-o Schneider. Regulaj kunvenoj ĉiumerkrede je la 20a en hotelo „Tiroler".

*Kutná Hora.* Jubilea kurso, jam la 25a depost fondo de loka movado. 10 komencantoj, instruas s-o direktoro Al. Horáček.

*Liberec—Reichenberg.* 13. X. nova kurso de la urba kleriga societo. La Foiro reeldonis esp. afiŝojn. — 29. XI. kunveno en YMCA kun parolado de s-o Pravoslav Bradáč pri lia vojaĝado en norda Eŭropo. — Programo de la GEL-grupo: 3. I. Hübner: Pri nekonata temo. 10. I. W. Wabersich: Piede al la Roma kongreso. 17. I. Surpriza vespero. 24. I. Luda vespero sub gvido de s-ino Linhart. 21. I. Parolado de s-o Scholze: Stratoj kaj vojoj iam kaj nun. 28. I. Laborkunveno.

*Litice apud Plzeň.* 27. X. Kunveno de okcidentbohemiaj e-istoj kun parolado de s-o R. Bloch, Praha, pri la kongreso en Romo kun lumbildoj. E-a prediko de P. Severin Schlosser en la paroĥa preĝejo.

*Litoměřice—Leitmeritz.* Kurso. Kunvenoj ĉiulunde je la 20a en gastejo „Stadt Rumburg".

*Lubná.* Okaze de la Propaganda semajno ekspozicio en montra fenestro de s-o Večeře, afiŝoj tra la urbo. Regulaj dimanĉaj kunvenoj en la hejmo de s-o Večeře.

*Mladá Boleslav.* 10. X. EK aranĝis paroladon de Dro Marek pri insulo Malto kaj Mediteranea maro. — 22. X. malfermo de Ĉe-metoda kurso gvidata de s-o prof. J. Kožený.

*Mnichovo Hradiště.* 2. X. propaganda parolado de s-o St. Malý, instruisto; propagando per afiŝoj kaj ekspozicio en montrofenestro; malfermo de kurso por 6 komencantoj, instruis laŭ Kilian s-o Zd. Blažek.

*Moravská Ostrava.* Kursoj: komencula kaj perfektiga ĉe „Masarykova vyšší škola lidová"; senpaga konversacia kurso en germana burĝa lernejo kaj komencula kaj perfektiga kurso en YMCA; la YMCA-kurso malfermiĝis la 11. I., instruas ĉe-metode s-o Pravoslav Bradáč, aŭtuna kurso de YMCA finiĝis en decembro kun 18 p. — 24. IX. parolado de Inĝ. L. Krajc: Kun la verda stelo tra Italujo al Afriko. — EK: 28. I. jarkunveno; regulaj kunvenoj la duan kaj kvaran mardon ĉiumonate; EK jubileas pro 10-jara ekzisto. — Germanaj sam-anoj kunvenas la unuan merkredon ĉiumonate je la 20a en hotelo Imperial.

*Orlová.* 13. X. kurso aranĝita de E. Rondeto „Emo".

*Plzeň.* Laboristoj: 30. IX. 35 malfermo de kurso. 27. X. propaganda parolado de s-o J. Pech en Laborista Domo, Plzeň-Doubravka, kiun sekvis malfermo de kurso por komencantoj. Oftaj dimanĉaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo. 22. I. 36 jarkunveno. Estas starigita Jubilea fondaĵo por kolekti rimedojn por laborista propagando de E en la ĉirkaŭa regiono. Dum januaro malfermita ekspozicio „Kion faras laboristo dum libera tempo" havas e-an fakon. 7. XII. kunveno de okcidentbohemiaj e-istoj por soleni la memoron de Dro Zamenhof, en restoracio „U nové pošty", kie okazas regulaj ĉiumonataj kunvenoj. — Germanaj sam-anoj kunvenas ĉiulunde je la 20a en hotelo „Deutsches Haus".

*Poruba apud Orlová.* Depost 2. II. funkcias nova kurso.

*Praha.* EK: aŭtuna kurso finiĝis en decembro. 10. XII. Nikolaa Vespero. 13. XII. Tago de la Libro, parolis s-oj Hromada kaj Šustr. 5. II. malfermo de nova kurso por komencantoj, instruas s-o Hromada, 7. II. malfermo de perfektiga kurso en la klubejo. — EK Malá Strana ŝanĝis sidejon, nuna adreso kaj kunvenejo: restoracio „Dašek", Praha III., Újezd 5; kunvenoj ĉiuĵaŭde; kurso de post 26. IX. — Verda Stelo: zorge organizitaj programaj ves-

peroj ĉiuĵaŭde sub gvido de diversaj sam-anoj, ekz. 21. XI. parolado de Dro Goldberger pri somerrestadejo Lázně Bělohrad; ĉeestis sam-anoj el tiu loko; 23. I. S-ino Weleminsky, Piknika Vespero; 3. II. publika lumbildparolado de Dro A. Liebus pri paleontologio. — Katolikoj: 17. X. parolado de s-ino Št. Bálková pri la Roma Kongreso; regulaj kunvenoj ĉiuĵaŭde je la 20a. — Blinduloj: SOĈNE organizis kursojn; en la instituto de Deyl 15 komencantojn oficiale instruas laŭ Kilián f-ino R. Kratochvílová, en la inst. de Klár gvidas kurson por 5 germanaj komencantoj s-o H. Moder, ĉeĥajn blindulojn en Klár instruas f-ino K. Vavrušová.

*Prešov.* 12. XII. Propagandaj kaj lernkunvenoj ĉiumarde alterne en sukeraĵejo Führer kaj kafejo Berger.

*Příbor.* 19. XII. kurson aranĝis „Místní osvětová komise", 40 komencantoj, instruas Ant. Sattek laŭ metodo Kilian kaj Ĉe.

*Radvanice.* 3. IX. malfermo de Ĉe-metoda kurso por komencantoj. — 26. I. jarkunveno de EK „Nova Vivo".

*Rychnov.* 1. X. publika kunveno de samideanoj kun akcepto de novaj membroj.

*Semily.* 1. X. kurso por 5 komencantoj. Instruas s-o J. Saska.

*Slezská Ostrava.* 2. XI. malfermiĝis senpaga kurso. Regulaj kunvenoj de la E-ista Rondeto ĉiusabate je la 19a en nova sidejo: Lidový dům, Na Kamenci.

*Stonava.* 10. XI. malfermo de kurso por komencantoj.

*Svitavy—Zwittau.* La agema loka grupo Verdstela Frataro, gvidata de s-o K. Karger, diversmaniere klopodas por altiri internacian intereson al sia loko, kie ĝi preparas someran libertempejon e-istan. Festkunvenon por soleni la naskiĝtagon de Zamenhof, ĉeestis ankaŭ samideanoj el Česká Třebová kaj Třebovice. Kursoj: I. XI. por 21 komencantoj kaj 5. XII. por 29 komencantoj-senlaborulinoj, instruado germanlingva de s-o Karger laŭ Ĉe-metodo.

*Teplice-Šanov—Teplitz-Schönau.* Regulaj kunvenoj la unuan kaj trian mardon ĉiumonate je la 20a, hotelo „Zentral" en Trnovany-Turn.

*Třebíč.* „Okresní osvětový sbor" malfermis la 5. XI. kurson, kiun gvidas s-o Th. Kilian. 21 p.

*Turnov.* 20. XI. malfermiĝis post bona propagando kurso por 19 komencantoj. Laŭ lernolibro de Kilian instruas Zd. Blažek el Mnichovo Hradiště.

*Uherské Hradiště.* Kursoj de SEK por lernej-infanoj kaj maturuloj. Instruis faka instruistino s-ino H. Kořínková. 14. XII. Nikolaa Vespero en Grandhotel, kie okazas regulaj kunvenoj de SEK ĉiumarde je la 20a.

*Ústí n. L.—Aussig.* Ĉsl. laborista E-ligo, centro Ústí n. L., aranĝis skriban kurson por germanaj laboristoj. Informoj: S-ino F. Richter, Aussig, Fünfhaus 5. Regulaj kunvenoj de germ. sam-anoj je la 20a en kafejo „Volkshaus".




## 28-a Universala Kongreso de Esperanto

okazos de la 8-a ĝis 15-a de aŭgusto 1936 en Vieno. Kotizo Kč 218·—, por familiano Kč 142·—, por gejunuloj ĝis 18 jaroj Kč 95·—. Kiu sendos la monon ĝis 30-a de aprilo, pagos Kč 180·—, famil. Kč 112.—, gejunul Kč 70·—, ĝis 30-a de junio Kč 186·—, Kč 126·— kaj Kč 83·—.

Ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj partoprenantoj de la kongeso ĝuos rabaton sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj, eksterlandanoj havos sepagan ĉeĥoslovakan vizon.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista aranĝos komunan vojaĝon. Anoncu vin plej rapide kaj vi ricevos ĉiujn informoj. Aldonu afrankon por respondo.

---

*Varnsdorf.* Regulaj kunvenoj la unuan kaj trian ĵaŭdon ĉiumonate je la 20a en hotelo „Blauer Stern".

*Vítkovice.* 30. IX. „Lidová škola" aranĝis kurson, instruis s-o Vl Slaný. — Nova kurso de Lidová škola malfermiĝis la 22. I. — 31. I. komenciĝis kurso organizita de la Virina komisiono de la naci-socialista partio.

*Vrútky.* Fine de septembro 1935 malfermiĝis kurso.

*Znojmo—Znaim.* Preparoj por akcepti ekskurson de la Kongreso de katolikaj e-istoj, kiu okazos 1936 en Brno. 7. XI. informa parolado de Msgre Kobza. — 12. XI. germanlingva parolado de Hofrat Hugo Steiner, Wien, pri la pasinta kaj venonta Univ. Kongresoj. — 14. XI. malfermo de kurso aranĝata de la loka grupo de katolikaj e-istoj. 20 komencantojn instruas s-o H. Höfert. Germanaj samideanoj kunvenas regule ĉiuvendrede je la 20·30 en gastejo Woydich.

*Žilina.* Fine de septembro malfermiĝis kurso.

**Fine alvenis**

# ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO!

Redaktis d-ro St. Kamaryt kaj Otto Ginz. — Unu el la plej belaj libroj en esperanta literaturo. Sur 468 paĝoj grandformataj majstraj tradukoj de ĉeĥoslovakaj prozo kaj poemoj el la lastaj cent jaroj de Havlíček ĝis Halas. Enkonduka studo pri ĉeĥoslovaka lingvo estas speciale verkita por la Antologio de prof. Vážný de universitato en Bratislava. Artikolon pri ĉeĥoslovaka pentro- kaj skulptarto akompanas 32 tutpaĝaj ilustraĵoj. Kiel ekzemplo de pli frua kulturo estis antaŭmetita „Stalisto kaj studento", la fama poemo el dekkvara jarcento en brila esperanta traduko. Zorge farita libro laŭ enhavo kaj eksteraĵo.

La verko trovis merititan akcepton de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. La unua sendaĵo liverita de la eldonejo estis dum tri tagoj komplete vendita.

La Libroservo de ĈAE vidis tial utila mendi tuj novan grandan kvanton, por ke ĝi povu ĝin ekspedi daŭre por nealta prezo. La Ĉeĥoslovaka Antologio povas nun esti liverata por Kč 60·— broŝurita, por Kč 70·— bone bindita, por Kč 80·— en luksa leda bindo. La ekspedo okazos post nemultaj tagoj laŭ sinsekvo de venantaj mendoj.

## Radio.

Depost la listo publikigita sur p. 55 de pasintjara Bulteno okazis esperanto-disaŭdigoj el

**Brno** (samtempe Praha I., Moravská Ostrava):

4. XII. Momentoj el vivo de d-ro Esperanto. (Biografia filmo pri vivo de kreinto de Esperanto D-ro Zamenhof.) Verkis Th. Kilián. Ludis TRAKT. Reĝio J. Bezdíček.
18. XII. Ĉeĥa Betlehemo. Verkis Miloš Kareš. Tradukis Jan Filip. Muzikon komponis Jaroslav Křička. Aktoris TRAKT. Reĝio D. Chalupa.
22. I. Koncerto kun anoncado ĉeĥ- kaj esperantlingva.

**Košice:**

29. I. Intervjuo de J. Friedrich al lektoro H. Seppik el Estonujo.

**Moravská Ostrava:**

3. XII. Karel Kapek: La muzikkomponisto Zdeněk Fibich kaj lia verko.
10. XII. Frant. Bosák: La interrilatoj de ĉeĥoj kaj poloj en estinteco.
17. XII. Ervín Tengler: Sileziaj kutimoj antaŭkristnaskaj, kristnaskaj kaj postkristnaskaj.
30. XII. Inĝ. L. Krajc: Evoluo de la radio-industrio en Ĉeĥoslovakio.
14. I. Boh. Pater: Organizo de skiado en Ĉeĥoslovaka respubliko.
21. I. Oskar Gadula: Ĉeĥoslovaka popola arto.
28. I. Karel Kapek: Evoluo de libropresado en Ĉeĥoslovakio.

---

**Korespondi deziras:** s-ro Alberto N. V. Freitas, Beco do Anselmo 9, Carne Azeda, Funchal, Madeira, Portugalio. — S-ro Stefan Florcyk, oficisto de naftofabriko, Trzebinia 2, poŝtfako 23, Polio.

## Saluton!

Veninte antaŭ kelkaj tagoj al via bela kaj ĉarma lando, mi salutas vin kore, ĉeĥoslovakaj gesamideanoj kaj kunbatalantoj por Esperanto. Jam delonge mi havis grandan intereson kaj simpation al via demokrata kaj kultura lando, tial mi estas tre feliĉa, ke fine ebliĝis al mi veni tien ĉi kaj en laboro por nia kara afero resti inter vi kelkajn monatojn. Mi esperas, ke dum tiu tempo mi povos konatiĝi kun multaj el vi kaj ĝui vian energian, sindonan kaj fertan kunlaboradon.

Mi esprimas mian grandan ĝojon pri tio, ke fine ankaŭ Ĉeĥoslovakio aliĝas al la rondo de landoj, sisteme laborantaj per la genia kaj sukcesiga Ĉe-metodo, kaj esperas, ke ankaŭ tien ĉi ĝi alportos novan entuziasmon kaj belajn sukcesojn. Sed komprenebl ankaŭ la Ĉe-metodo estas nur ilo kaj la sukcesoj ne venas per si mem: ĉio dependas de energia, ferta kaj sistema kunlaborado de ni ĉiuj!

Dezirante al vi feliĉan kaj sukcesriĉan novan jaron kaj multe da energio kaj persisto en nia malfacila idea laboro, mi estas via

**Henrik Seppik,**
instruisto de la Internacia Ĉe-Instituto.

Košice, januaro 1936.

---

## Oficeja fondaĵo.

Depost la lasta listo publikigita sur p. 47 de pasintjara Bulteno alvenis jenaj pluaj donacoj:

| | | |
|---|---|---|
| Jar. Kolčava, Zastávka u B. | Kč | 4·— |
| Ant. Richter, Ješín | „ | 4·— |
| F. Straka, Praha, Spořilov | „ | 12·60 |
| Esperantista Klubo, České Budějovice | „ | 100·— |
| B. Trybenekr, St. Paka | „ | 5·— |
| Sumo de la lasta listo | „ | 2487·70 |
| Sumo la 31. XII. 1935 | Kč | 2613·30 |

Ili ĉiuj akceptu nian sinceran dankon!

# Movado.

**Ŝtataj ekzamenoj pri esperanto.** Ni insiste admonas niajn membrojn-instruistojn, ke ili anoncu sin por ŝtata ekzameno pri esperanto dum nuna printempo, ĉar malpli frue — almenaŭ provizore — ne estos plu eble fari tiun ekzamenon. Nia Libroservo prizorgos por vi la literaturon necesan por preparo.

**XIV-a Internacia Tendaro de Skolta Esperantista Ligo** okazos nunjare de la 18-a ĝis 29-a de julio en Ipswich, la ĉefurbo de grafiando Suffolk en orienta Anglujo. Ipswich, kuŝanta sur la rivero Orwell, estas plej karakteriza angla urbo, kuŝanta en trankvila pitoreska pejzaĝo. La Internacia Tendaro estos bonega okazo por skoltoj konatiĝi kun anglaj lando kaj spirito kaj kunveni kun ĉiunaciaj amikoj. La aliĝon kun 4 respondkuponoj sendu al prez. de la Organiza Komitato kaj redaktoro de Skolta Bulteno s-ro F. Douglas Murphy, 54, Constable Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo. Tendar-kotizo, pagota post eniro en la Tendaron, estas 1 angla funto (120 Kč), por kiu sumo oni ricevas nutradon dum la daŭro de la Tendaro, tendon, terkovrilojn, kuirilaron ktp.

**Slovaka Ŝlosilo.** Nova reviziita eldono de la slovaka Ĉefeĉ-Ŝlosilo trovas ĝeneralan plaĉon. La bela broŝureto rapide disvastiĝas. Mendu baldaŭ ĉe Libroservo de ĈAE — unu ekz. por Kč 1·20, 10 ekz. por Kč 11·—, 50 ekz. por Kč 45·—, 100 ekz. por Kč 80·— afrankite. Por informi niajn slovakajn membrojn pri tiu nova eldonaĵo, ni sendis al ili po 1 ekz. kun peto pri resendo en okazo de neintereso. La nomojn de la neresendintoj ni publikigos.

**Slovak-lingva eldono** de la tre sukcesa propaganda flugfolio laŭ normo de UEA **Jeden jazyk pre celý svet** estas ĵus aperinta. Mendu ĝin tuj ĉiu, kiu volas repreni propagandan laboron praktikatan de respektinda nombro de samideanoj antaŭ nemultaj jaroj. Mendu ĝin precipe ĉiuj kluboj, ne sole la slovakaj, ankaŭ la ĉeĥaj! Unu cento da ekzempleroj kostas 20 Kč! Afrankite! 10 ekz. kostas 2·40 Kč afrankite.

---

## Libroj kaj gazetoj.

*Th. Kilian*: *Esperanto. Učebnice a čítanka.* II-a eldono. Brno 1935. 112 pĝ 6·5x10·5 cm. Prezo Kč 6·60 afr. — Pruvo, ke la lernolibro estas bona kaj ŝatata, estas la rapide disvenditaj 5000 ekz. de la unua eldono. Por la aldonita legolibro la aŭtoro sukcesis kolekti kontribuaĵojn el 48 diversaj landoj. Utila estas ankaŭ la vortareto ĉe la fino de la libro.

Pravoslav Bradáč: *Sever nás láká.* Eldonejo Slavard, Mor. Ostrava 1935. 120 pĝ. 13x20 cm. Prezo Kč 12·80 afrankite. — La aŭtoro estas juna esperantisto vojaĝinta tra la nordaj landoj kaj kolektinta siajn bonajn observojn en plaĉa volumo. Laŭ propaganda vidpunkto valoraj kaj por ni speciale interesaj estas la ripetaj mencioj, kiel utilis la aŭtoron lia scio de internacia lingvo. Krome unu speciala ĉapitro estas dediĉita al esperanto. Legante la vere legindan vojaĝan priskribon ni devas rememori Jiří Frankenberger, esperantiston, kiu ankaŭ vojaĝis en la nordo kaj kiun ni dum lia unua vojaĝo efike helpis. La esperantistoj scias de li, ke li havis tre interesajn spertojn pri esperanto, sed pro kaŭzo al ni ne konata s-ro Frankenberger evitis tion diri al neesperantistoj, kvankam li en siaj multnombraj paroladoj kaj en siaj spritaj gazetaj artikoloj havis oftan eblecon por tio.

Peter Frey: *Esperantaj Historietoj I.* Eldonis Peter Frey, Clausensvej 26, Haderslev, Danlando 1935. 48 pĝ. 13·5x19·5 cm. Simplaj rakontoj, tre utilaj por ĉiu finlerninto de esperanta gramatiko kaj serĉanta facilan legaĵon. Tre bone povos la libreton uzi ĉiu kurso por progresintoj. Ĉe mendo de pli granda kvanto koncedos L. S. specialan prezon.

*Zpravodaj zaměstnanců st. železnic v Bratislavě*, oficiala organo de la fervoja direkcio en Bratislava, publikigas ripete priesperantajn artikolojn, depost januaro ankaŭ esperantan gramatikon. La progresema direkcio fervoja en Bratislava montras ĝustan komprenon por internacia lingvo. La fervojistoj certe salutos la valoran rubrikon.

---

## Lastaj ŝtataj esperanto-ekzamenoj dum nuna printempo.

Anoncu vin tuj! Libroservo de ĈAE povas liveri senprokraste ĉiun verkon necesan por la preparo, ekz.:

| | | |
|---|---|---|
| *O zkouškách z esperanta* | Kč | 2·— |
| Dr. Šilha, *Učebnice* | „ | 10·— |
| *Ŝlosilo de Esperanto*, ĉeĥa 80 hal., slovaka | „ | 1·20 |
| Šupichová, *Rádce českého esperantisty* | „ | 5·— |
| „ *Esperanto, jeho vývoj a význam* | „ | 5·40 |
| Kilian, *Esperanto a jeho tvůrce* | „ | 2·— |
| Collinson, *Esperanto a jeho kritikové* | „ | 2·— |
| Dr. Kamaryt, *Mezinárodní jazyk* | „ | 8·60 |
| *Svaz národů o esperantu* | „ | 5·— |
| Waard, *Esperanta literaturo* | „ | 13·50 |
| Isbücker, *Historio kaj organizo de E.* | „ | 13·50 |
| Sakaria, *Enkonduko en la pedagogion* | „ | 5·20 |
| *Plena vortaro de esperanto*, II. eld. bind. | „ | 100·— |
| Kühnl-Procházka, *Slovník česko-esp.* | „ | 26·50 |
| Filip, *Velký slovník esperantsko-český* | „ | 29·20 |
| Kalocsay-Waringhien, *Plena Gramatiko* | „ | 53·— |

Prezoj por afrankita sendo en Kč. Pagu al la poŝtŝparkasa konto nro 12371 de „Svaz československých esperantistů, Praha“.

# LIBRO-SERVO de ĈAE.

## *Lernolibroj:* Kč

Bouška H. K., *Škola esperanta.* 160 pĝ. 15x22 31·—
Eiselt Josef, *Esperanto pro každého,* 76 pĝ. 21·—
Kilian, *Esperanto.* Mluvnice, čítanka, 2 slovníky. 110 pĝ. 12x19 . . . . . . . . . . 6·60
*Klíč esperanta.* 24 pĝ. 7x11 . . . . . . —·60
*Kľúč esperanta,* 32 pĝ. 7x11 . . . . . . 1·20
Šilha dro Ant., *Učebnice esperanta.* 96 pĝ. 12x20 10·—
Šupichová, *Esperanto,* mluvnice a cvičebnice. 4-a eld., 128 pĝ. . . . . . . . . . . 10·80
Šupichová, *Kniha česko-esperantské konversace.* 124 pĝ. 12x19 . . . . . . . . . 3·80
Šupichová, *Legu kaj parolu!* Esperanta legolibro. 212 pĝ. 12x19 . . . . . . . . 6·20
Šupichová, *Malá učebnice esperanta.* 72 pĝ. 11x12 2·60
Žďárský-Procházka, *Učebnice esperanta.* 352 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . 21·—

## *Vortaroj:*

Berger L., *Česko-esperantský slovníček.* 96 pĝ. 11 x 17 . . . . . . . . . . . . . . . . 14·—
Čánský-Riedl, *Slovník esperantsko-český,* 310 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . . 20·80
Filip, *Velký slovník esperantsko-český,* 410 pĝ. 11·5x16 . . . . . . . . . . . . 29·20
Ginz, *Radiovortaro kvinlingva.* 218 pĝ. 12x15 . 5·50
Hromada-Petr, *Slovníček esperantsko-český.* Pli ol 6000 vortoj. 108 pĝ. 10x14 . . . 6·80
Kamaryt, *Filozofia vortaro.* 170 pĝ. 13x18 . . 29·—
Kühnl-Procházka, *Slovník česko-esperantský.* (25.000 vort.) 284 pĝ. 12x18 . . . . 26·50
Plehn, *Vortaro de manaj segiloj kvinlingva.* 32 pĝ. 14x21 . . . . . . . . . . . 12·50
*Plena vortaro de esperanto.* 2-a eld. 511 pĝ. 15x20. Bindita . . . . . . . . . 100·—

## *Verkoj pri lingvo kaj movado:*

*BES-Adresaro* de esperantistoj el ĉiuj landoj. 11-a eld. 108 pĝ. 11x14·5 . . . . . . 8·20
*Bulteno de ĈAE* 1933, 48 pĝ. 18x27 bindita 11·—
Collinson, *Esperanto a jeho kritikové.* 24 pĝ. 2·—
Kamaryt, *Mezinárodní jazyk.* 74 pĝ. 14x19 . 8·60
Lanti, *Dělnický esperantismus.* 36 pĝ. 13x18 . 2·70
*Svaz národů o esperantu.* Zpráva o esperantu, již vypracoval jeho gen. sekretariát. 48 pĝ. 12x17·5 . . . . . . . . . . 5·—
Takács, *Katalogo de esperanto-gazetoj.* 168 pĝ. 11x15 . . . . . . . . . . . 15·60

## *Literaturo:*

Filip, *Kantareto.* Zpěvník čsl. nár. písní přelož. do esperanta. 62 pĝ. 10x17 . . . . . . . 4·20
Herben dro Jan, *Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.* Biografio de T. G. Masaryk. 126 pĝ. 14x19 17·—
Herrmann Ignát, *Fokso—Nukso.* 68 pĝ. 14x19. Bindita . . . . . . . . . . . . 13·80
*Internaciaj konvencioj pri fervojaj trafikoj.* 254 pĝ. 20x16 . . . . . . . . . . 24·40
Kamaryt dro Stanislav, *Unua kristana slovaka princo.* 14 pĝ. 12x15 . . . . . . . . 1·—
Mahen Jiří, *La koboldo Ondra.* 46 pĝ. 11x14 . 3·20
Milič-Šamla, *Per poŝtmarko kaj Esperanto ekkonu la mondon.* 10 pĝ. 15x21 . . . . 1·70
Rákosi V., *For la viandon.* Bonhumoraĵoj. 46 pĝ. 10x16 . . . . . . . . . . 5·20
Sumín Jiří—Růžena Svobodová, *Du noveloj.* 84 pĝ. 14x19. Bindita . . . . . . . 13·80
Šupichová, *Samideana vortaro,* 20 pĝ. 10x14 . 2·50
Ulrich F., *Skizoj el Esperantujo.* 32 pĝ. 11·5x15 5·20
Vladyka Ladislav, *Mi en li.* 194 pĝ. 14x18. Bind. 27·20
Vrchlický Jar., *Nokto en Karlův Týn.* 72 pĝ. 14x21 . . . . . . . . . . . . . 6·40
Welzl Jan, *Tridek jaroj en la ora nordo.* 318 pĝ. 14x19. Bind. . . . . . . . . . . 40·80

Ĉiuj eldonaĵoj de Literatura Mondo kaj de AELA.

*

*Gvidfolio de Praha.* Ilustr. 12 pĝ. 11x25. . . 1·20
*Gvidlibro tra Kolín,* 16 pĝ. 12x16 . . . . 1·—
*Poŝtkartoj* kun verda stelo aŭ kun emblemo de UEA aŭ kun geogr. karto de Ĉeĥoslovakio 25 ekz. Kč 3·50, 50 ekz. Kč 6·50, 100 ekz. Kč 12·—

*

*Literatura Mondo.* Ĉeĥoslovaka numero . . 6·—
" " Kelkaj ekzempleroj sur kreta papero " 8·—
" " abono 10 nroj jare . . . 60·—
*La Pirato.* Monata. 12 n-roj . . . . . . 20·—
*Nia Gazeto.* Monata. 12 n-roj . . . . . 20·—
*La Praktiko,* jare . . . . . . . . . 40·—

*

*Gramofona disko* kun „La Espero“ kantita de Bakule-ĥoro . . . . . . . . . . . 30·—

*

*Esperantaj insignoj* de div. specoj. Postulu specialan liston.
*Stampilo* kun via adreso 50x13 mm . . . 16·—

**Afranko enkalkulita, por registrita sendo aldonu Kč 2·—.**

**Pagu al la poŝtĉeka kto „Svaz čs. esperantistů, Praha“ n-ro 12.371.**

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák Jablonné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933 - Podací úřad Praha 45.